



10 JAROJ DA VERDAJ SKOLTOJ:
BILANCO KAJ PERSPEKTIVOJ

ESPERANTO EN MARCHE

28 SEP – 1 OKT 2023
BENELUKSA KONGRESO

ni faris

POSTKONGRESO IFEF
PEKO EN TILFF

ni faras

KURSO EN HUY
VERDAJ SKOLTOJ

ni faros

BENELUKSA KONGRESO



Revue trimestrielle belge

ÉTÉ 2023 - N°2

Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

La foton sur la kovrilo faris Eddy Van den Bosch dum PEKO 2023.

Devenir membre / Membriĝi

MEM (membre > 25 ans + revue) 25 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 12 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

BE33 5230 8132 1946 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 kristin.tytgat@skynet.be
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Contenu / Enhavo

- IFEF-postkongreso - 4
- PEKO okazis en Tilff - 6
- Beneluksa Kongreso - 9
- Verdaj Skoltoj - 10
- Dulingva libro tradukita - 14
- Vespa Pikniko - 15
- Lingvo: TRA et TRANS - 16
- Krucvortenigmo - 18

Colofon / Kolofono

Ce magazine est édité par l'asbl Espéranto Wallonie - Rue de la Terre Franche, 33 - 5310 Longchamps.
Rédacteur en chef : Jean Annet
Rédaction et mise en page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun Communications à Strée



Éditorial Antaŭparolo

Saluton al ĉiuj

Ce numéro d'Espéranto en Marche met à l'honneur 3 grandes activités que nous avons fait et ferons cette année : le post-congrès de l'IFFEF organisé par le groupe de Charleroi, PEKO et les 10 ans des Verdaj Skoltoj et enfin notre gros congrès de l'année : le Beneluksa Kongreso.

Pour celles et ceux qui ne peuvent pas s'inscrire en ligne, nous ajoutons en pages centrales le formulaire d'inscription. Nous vous attendons toutes et tous à cet évènement qui, nous l'espérons sera un grand succès. D'autre part, nous vous donnons aussi rendez-vous à notre désormais traditionnel 'Vespa Pikniko' où toute nouvelle personne est bienvenue et, pour celles et ceux qui aiment la musique au Festival LaSemo où nous serons également présents.

Voici quelques évènements où nous espérons vous rencontrer de nouveau.
A très bientôt.

Jean ANNEN

Congrès à Charleroi

Okazis IFEF-postkongreso en Valonio

En majo 2023 la IFEF-kongreso okazis en Antverpeno kaj la postkongreso en Valonio.

Vendredon la 12an de majo, 19 postkongresanoj entrajniĝis matene el Antverpeno al Charleroi. Ni renkontiĝis en la stacidomo de Charleroi kaj iris tuj al la junulargastejo por la tagmanĝo. Posttagmeze ni vizitis la « Arbaron de Cazier » en Marcinelle. Georges Sossois ĉiĉeronis nin kaj rakontis interesajn aferojn pri la terura katastrofo de la karbomino, kiu okazis la 8an de aŭgusto 1956. Ni vidis multajn fotojn kaj rigardis filmon pri tiu grava evento. poste ni vizitis la muzeon de la industrio. Pluraj interesiĝis pri tio. Aliaj vizitis la muzeon de la vitro kaj admiris kelkajn belajn realizaĵojn.

Sabaton matene la 13an de majo, ni entrajniĝis al Namuro. Pieden ni iris de la stacidomo ĝis la telfero promenante tra la urbo: ni vagadis tra la bazaro, aŭskultis klarigojn pri la urbodomo, la placo de la Anĝelo, la placo de Armiloj (kun « Djoseph kaj Françwès »), la Belfrido, la « Halle al Chair », la kunfuejo Sambro kaj Mozo. Ĉirkaŭ tagmezo, per telfero, ni alvenis al la citadelo. Ni tagmanĝis ekstere sur la teraso vidalvide al Terra Nova : agrabla etoso ĉar la vetero estis kun ni. Je la dua horo, la trajneto kondukis nin tra la citadelo dum duonhoro.

Ni revenis ĉe Terra Nova kaj rigardis fotojn kaj filmeton pri la historio de Namuro. Fino de la posttagmezo ni revenis per telfero kaj vizitis malnovan kvartalon de Namuro : la placo de « Legommerkado » kun la plej malnova trinkejo de Namuro : la « Ratin-tót ». Finfine ni vizitis 2 preĝejojn : St-Loup kaj la katedralon St Aubain.

Dimanĉon matene la 14an de majo, ni enbusiĝis al Strépy-Thieu (apud La Louvière). Matene ni vizitis la ekspozicion : « Akvovojoj de hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ » kaj rigardis tre interesan filmon pri tio. Ni tagmanĝis en la kafeterio kaj trinkis bonan bieron de la regiono : la « St Feuillien ». Je la dua horo : vojiro per turisma trajneto ĝis la ŝipo kaj krozado sur ŝipo kun transiro de hidraŭlika lifto kaj de aŭtomata kluzo, kaj pasejo de moveblaj pontoj. La homoj tre multe ŝatis. Vespere dum la vespermanĝo, kelkaj el nia klubo preparis la salonoron por la adiaŭa vespero ... kaj por festi la datrevenon de Rodica Todor (prezidantino de IFEF). De la oka ĝis la deka kaj duono vespere, ni trinkis, manĝis kukojn kaj kantis kantojn en la valona lingvo. Ĉiuj ĝuis la mirindan etoson !!! Estis belega postkongreso !

Dankon al Francine, Jeanne, Georges, Lucien kaj Hubert, kiuj bone helpis min.

Michèle VILLERS





Ça fait déjà dix ans !

PEKO okazis en Tilff

PEKO estas Printemps-Esperanto-Kunveno, sed jam de kelkaj jaroj ĝi fariĝis kvazaŭ belga kongreso. Ĉi-foje oni festis la jubilean dek-jariĝon de « Verdaj Skoltoj », kiuj organizis la aranĝon en la urbeto Tilff sub la gvido de Valère Doumont, nomata Lupo La organiza teamo konsistis el dek skoltestroj kaj aliaj skoltoj inter kiuj dek ses adoleskantoj kaj ok junuloj. Estis akceptitaj tri novaj skoltoj al kiuj oni transdonis nigroverdan koltukon. Skoltoj havas kromnomojn, tiel aperis inter ni Abel, Bizono, Briardo, Dingo, Korsako, Magoto, Mambao, Orcino, Neĝpantero.

Tilff estas urbeto proksima al la urbo Lieĝo. Ĝi situas en profunda valo de la rivero Outhre ĉirkauata de bela naturo kaj de arbaroj por agrablaj promenadoj. La urbeto famiĝis pro sia speciale karnaŭalo en kiu paradas « Poreuloj » – homoj trikolore vestitaj per longaj verdaj ĉapoj kun sonoriloj, blankaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ĉe la piedoj pajlo ĉirkauas la krurojn kvazaŭ radikojn. Gigantoj akompanas la grupon. En la urbeto staras fontano kun kolono ornamita per poreuloj.

PEKO-n partoprenis ĉefe junaj homoj el Belgio, Germanio kaj Francio. Entute kvindek geesperantistoj festis la dekjariĝon. Lu Wang alvenigis sep ĉinajn gejunulojn loĝantajn en

Germanio same kiel ŝi. Ili ĉeestis Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Christine Brücker laŭ diversaj instrumetodoj.

Ni loĝis en renovigita farmbieno de la kastelo Brusonde el la 18-a jarcento, adaptita por diversaj kulturaj okazajoj. Apuda lageto kun ĉisezone florantaj irisoj ĉe la rando kaj nimfeoj en ĝi, ornamas la parkon kaj donas belan vidon al la kastelo. Apud la loĝejo en antaŭa garbejo troviĝas unika muzeo pri abeloj. Ĝi prezentas filmojn pri la vivo de abeloj, posedas riĉan kolekton de abelbredaj objektoj el diversaj epokoj kaj amason da belgaj kaj eksterlandaj abeluloj skulptitaj el trunkoj. En la muzeo estas ankaŭ instalitaj du vitraj abeluloj por ebligi spekton de la agado de la abeloj. La muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1974.

Dum la evento okazis diversaj programeroj. Bernard Regis prelegis kaj prezentis diversajn mapojn. Skoltoj priskribis la historion de la skoltismo, parolis pri siaj agadoj, aktivadoj, distraĵoj kaj aventuroj kiujn ni povis spekti ankaŭ bilde. Ili rakontis pri diversaj grupoj, laboroj kunvenoj, semajnfinoj kaj tendumadoj. Ni eksciis multon pri skoltismo – pri la tutmonda movado, pri ĵamboreoj, totemoj, diversaj insignoj

kaj simboloj. Ili konigis al ni la skoltajn legon kaj promeson kaj informis ankaŭ pri vojaĝkonkurso kaj muzikalo dum la IJK. La himno de la Verdaj Skoltoj estas: « La aŭto de la ĉef'... » Ili kunvenis krom en Belgio ankaŭ en Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando. En la jaŭda vespero Ideal Gabalda organizis cirklodancadon. Ĉiuj fervore sekvis la instrukciojn kaj bone amuziĝis.

Dum la tago la partoprenantoj distriĝis per diversaj ludoj, kunkantis, provis muziki per tubetoj, konstruis simplajn aŭ pli komplikajn objektojn per lignaj bastonetoj, branĉetoj, tolajoj, papero kaj ŝnuretoj, faris origamion, ŝtofcolorigis ĉemizojn aŭ sakojn. Okazis ankaŭ gustumado de bieroj, kaj vespere eblis spekti filmojn aŭ ĉeesti noktan ekskurson. Por la posttagmezoj estis organizitaj ekskursoj – vizito al la urbo Lieĝo kaj kajakado sur la rivero Outhre, kie kelkaj spertis banadon ĉe renversiĝo de kajako. Iuj piedpromenis ĝis la abatejo Brialmont. Sur la ludtereno de la bieno aperis ankaŭ alia skolta grupo.

Ni manĝis precipe vegetare, kelkaj vegane. Bongustajn pladojn kuiris por ni Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch

kun la helpo de skoltoj en la kuirejo. Ni havis okazon gustumi ankaŭ ĉinan manĝaĵon (farĉitan pastajon) pretigitan de ĉinaj gastoj kaj anas-ovojn, kiujn provizis Valère. Ne mankis ankaŭ frititaj bananoj kun fandita ĉokolado, specialaĵo de Verdaj Skoltoj. Ĉi-foje ili ne estis rostitaj rekte super fajro kiel oni kutimas fari en la naturo, sed bakitaj en la forno.

Antaŭ la dimanĉa forveturo estis anoncita la premio de la « Granda ludo ». La gajnintoj ricevis jubilan bele ornamitan botelon, kiun ankaŭ eblis aĉeti por subteni la skoltan movadon.

Bone funkciis la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo. Esperantistoj el Lieĝo eldonis dulingvan libreton pri Tilff en Esperanto kaj la franca lingvoj. En la lasta vespero prezentiĝis la orkestro de tubistoj kaj la skeĉo pri « Kion diras vulpo? ». Poste ni ĝuis koncerton de Jonny M sekvatan de diskomuziko. Ĉiuj bone amuziĝis ĝis malfruaj horoj. Estis agrabla etoso inter junaj skoltoj. Dankon al la organizantoj.

Liba GABALDA

Congrès à Bouillon Beneluksa Kongreso 2023

Kara amiko,

Nome de la V.Esp-o, mi ĝojas inviti vin al la BENELUKSA KONGRESO kiu okazos en la urbo BOUILLON en la sudo de Belgio, la 28-an, 29-an, 30-an de septembro kaj la 1-an de oktobro.

BOUILLON estas la urbo de Godefroid de Bouillon. Ni evidentie vizitos la kastelon, sed ankaŭ la ĉirkaŭaĵon. Pluraj promenoj estas planitaj en la belega ĉirkaŭa kamparo.

Ni havos la grandan plezuron gastigi Katalin KOVATS (ĉefredaktoro de Edukado.net) kiu proponos altnivelajn kursojn.

Sabate vespero koncertos por ni Armel AMIOT. Li ankaŭ gvidos kantatelierojn. Ekkonu Armel en ĉi tiu filmeto: <https://mallonge.net/armel22>

La detala programo aperas en la kongresa retejo.

Bouillon ne havas stacidomon. Ni prizorgos taksiservon ekde Libramont.

Aliĝu rapide ĉe <https://benelukso.eu/kongreso> kaj spektu la malgrandan filmon.

Ni antaŭĝojas vian partoprenon !

*Jean ANNET
Prezidanto de la V.Esp-o*



Scouts Verts espéranto : interview

Verdaj Skoltoj: bilanco kaj perspektivoj

Cette année, nous avons, lors d'un PEKO mémorable à TILFF (voir l'article de Liba GABALDA en pages 6-8) fêté les 10 ans d'existence des Verdaj Skoltoj. Un anniversaire est un moment idéal pour parler bilan et perspectives, exercice auquel nous avons soumis Valère DOUMONT (Lupo), créateur et principal animateur des VS.

EEM. Pourquoi as-tu créé les Verdaj Skoltoj ?

Après avoir réalisé l'un de mes rêves (visiter le Japon) grâce à l'espéranto, j'ai voulu transmettre cette langue à mes neveux et nièce. Comme je voulais les faire rencontrer d'autres enfants, j'ai participé à NR (seul) puis à PSI (avec eux). Les rencontres familiales en espéranto sont très chouettes mais pas tout à fait adaptées pour un oncle et ses neveux. Comme il y avait une dizaine de jeunes ados (11-15 ans) en Belgique ou aux alentours et que j'avais fait du scoutisme, j'ai organisé une première rencontre d'un WE pour 11-15 ans fin octobre 2012. Les ados ont voulu continuer à se rencontrer et je les ai suivis.

EEM. Pourquoi avoir pris la forme d'une asbl ?

Nos premiers événements étaient sous ma propre responsabilité. Ensuite Espéranto Wallonie (APE) a soutenu notre groupe en nous faisant profiter de leur assurance responsabilité civile. En 2014 je consacrais un mi-temps pour le mouvement espéranto (Verdaj Skoltoj, PEKO, Excel'Langues, LaSemo) et je complétais avec des contrats à la semaine comme animateur. Pourquoi ne pas essayer de regrouper le tout pendant quelques mois ? Cela me permettrait de mener à bien les projets prévus, de consacrer du temps à rencontrer les associations scoutes de Wallonie-Bruxelles, de collaborer au congrès des enfants (IIK, UK Lille), etc... Espéranto Wallonie, quelques généreux donateurs en Flandre et le groupe de Bruxelles ont bien voulu soutenir financièrement ce projet. Initialement prévu pour 3 mois, nous avons réussi à financer un temps plein pendant une année complète.

EEM. Quel est votre public-cible ?

Notre troupe est a-confessionnelle, ouverte à tous et à toutes et il n'y a aucun pré-requis linguistique. Nous pouvons accueillir des jeunes de 8 à 20 ans.

EEM. Comment évolue leur connaissance de la langue ?

En général, les enfants s'approprient la langue assez facilement en interagissant lors des activités. Après un an, ils sont suffisamment à l'aise pour communiquer efficacement entre eux dans la plupart des situations. On évite ainsi l'écueil des « eternaj komencantoj ».

EEM. Combien d'ados sont passés par la case Verdaj Skoltoj ?

En 10 ans, 55 enfants (et 4 adultes!) ont, au minimum, participé à l'une ou l'autre activité. 30 d'entre eux ont été suffisamment assidus et ont montré une telle connaissance pratique de l'espéranto qu'ils ont pu recevoir un totem et, de la sorte, intégrer la grande famille.

EEM. Comment êtes-vous organisés ?

Les enfants grandissant et d'autres arrivant, il nous a fallu adapter notre structure et créer un véritable parcours qui démarre vers 8 ans et qui offre de véritables perspectives d'évolution au sein du groupe.

Les enfants sont répartis par tranches d'âge avec un encadrement spécifique : louveteaux (8 et 11 ans), éclaireurs (12 et 16 ans) et routiers (17 et 20 ans). Il n'y a pas de limite d'âge pour les « animateurs ».

Nous sommes également fort attentifs à la formation des futurs chefs en les encourageant (y compris

financièrement) à suivre une formation d'animateur et à passer un examen officiel d'espéranto. La gestion des vacances différenciées par pays, régions, communautés est un véritable défi...

EEM. Quelles sont vos principales activités ?

Nos activités ont beaucoup varié en fonction de nos participants. La troupe étant internationale, les domiciles de nos scouts sont assez éloignés géographiquement (Flandre, région parisienne, Allemagne, Suisse) et nous organisons maintenant moins d'événements mais de plus longue durée.

Notre événement le plus important est le même que pour tous les scouts : notre grand camp d'été ! Nous organisons aussi PEKO, et des rencontres selon les possibilités pour nos participants.

Certaine année nous sommes parvenus à organiser 8 WE et 2 camps, parfois seulement un camp (merci covid). Nous participons et contribuons régulièrement à certaines rencontres du mouvement espéranto (généralement IJK, NR, JES, PSI) ainsi qu'au Beneluksa Kongreso.

Notre groupe vit aussi via notre page Facebook et surtout notre groupe WhatsApp qui permet aux éclaireurs, routiers et animateurs de discuter de nos projets et de

préparer ensemble nos prochains événements.

EEM. Quelles sont vos sources de financement ?

Nous n'avons pas d'aide financière structurelle mais, outre la cotisations des membres, nous avons un certain nombre de donateurs individuels et réguliers.

PEKO, qui est une réunion d'adultes, est un peu notre fête d'unité. C'est l'occasion de faire connaître les VS et de récolter des fonds pour financer un camp d'été, la participation à IJK, TEJO et pour alimenter notre caisse de solidarité qui permet d'intervenir dans des frais de voyage.

EEM. Comment ton initiative a-t-elle été accueillie au sein du mouvement ?

Je pense que les personnes au sein du mouvement espéranto qui ont été scouts, ont très vite compris l'intérêt de créer un groupe scout actif où l'espéranto serait la seule langue possible de communication.

Mais il y a aussi ceux qui ont remarqué les difficultés pour les enfants « denaskuloj » de participer au mouvement jeune et de s'y investir. Ces personnes nous ont soutenu au sein de leurs associations, encouragé, proposé des collaborations, etc... Toutes les associations belges nous ont peu ou prou, soutenus.

Et nous avons essayé de mettre en place des relations de collaboration avec les associations proches

géographiquement (FLEJA, Espéranto-France, Skolta Esperanto Ligo).

EEM. Quelles sont les principales difficultés ?

Actuellement, nous manquons de ressources humaines pour la gestion de notre ASBL. Mais c'est une difficulté que nous partageons avec toutes les autres associations. Les années covid ne nous ont pas permis d'organiser PEKO, nous avons donc vidé nos réserves financières durant les camps (que nous avons quand même, entre deux confinements, réussi à réaliser!). Les derniers investissement (écussons, gourdes) ont pu être fait grâce à un don ponctuel.

Un groupe scout, c'est surtout des animateurs (nous avons la chance d'avoir une chouette équipe actuellement mais les jeunes adultes ont également une vie à construire) et des scouts. Comme les enfants et les ados grandissent vite, nous devons en permanence nous faire connaître et recruter des nouveaux membres. Nous sommes déjà parvenu à « scoutiser » et à « espérantiser » des jeunes extérieur au mouvement, mais c'est plus facile quand leurs parents parlent espéranto. En ce sens nous dépendons du mouvement « famille ».

EEM. Quelles sont tes plus grandes satisfactions ?

Personnellement, c'est de voir mes anciens scouts saluer les nouveaux lors de congrès jeunes comme IJK, de voir

les animateurs transmettent le flambeau aux nouveaux scouts, de pouvoir réaliser des grands projets avec « juste » quelques discussions de préparation, de voir des nouveaux louveteaux qui s'éclatent d'avoir trouvé un endroit où ils peuvent être eux mêmes...

Je suis aussi très fier de voir les adolescents prendre de plus en plus de responsabilité et devenir animateurs pour un camp, ou quelques années, ou depuis leur premier camp.

EEM. Comment vois-tu l'avenir ?

Il y a beaucoup d'opportunités mais aussi de difficultés en vue. Et encore beaucoup, beaucoup trop de travail !

Rédiger et transmettre notre méthode scoute, adapter le livre de la jungle pour nos louveteaux, publier une revue pour essayer de garder plus de lien entre nos rencontres, organiser le prochain camp d'été en partenariat avec REF, une rencontre en automne, et un camp à Strasbourg en parallèle au congrès européen, mettre à jour les nouveaux statuts pour notre asbl, trouver de nouveaux administrateurs et assurer la pérennité financière de l'Association...

Appel donc aux bonnes volontés et aux généreux donateurs...

Jean-Pol SPARENBERG



Photos de nos activités



Je sabato, la 10-a de junio, la Esperantogrupo de Lieĝo invitis gesamideanojn al vizito de la turo de Eben-Ezer kaj de la muzeo Eben-Emael. Sur la foto supre kaj sube interalie aperas niaj membroj Pierre Simon, Eric Nemes, Philippe Draize, Bernadette Poncelet, Richard Servais, Jean Annet kaj Freddy Close. Ĉeestis du lernantoj de la kurso en Huy: Delphine Vanseveren kaj Karima Tafrata. Kromaj gastoj estis Tabatha Fabri el Bruselo, Roland Rotsaert el Flandrio, Isabelle kaj Nicole Mankas Paul Kerris, la fotinto.



Yves Nevelsteen vizitis Eric Nemes kaj Richard Servais hejme en Lieĝo por instali la ĉapelilon Tapji sur la komputilo kaj Swift-Key sur la poŝtelefono. Poste li plu vojaĝis al Huy por klarigi al la lernantoj pri utilaj retejoj kaj iloj por esperantistoj. Li ankaŭ vendis librojn de la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo.



Le 14 juin, le groupe de Charleroi participait au Village des ainés avec un stand sur l'espéranto.



Assemblée générale Invito al la Vespa Pikniko 3/9

Le 3 septembre 2023 aura lieu :

De 10h à 12h30 l'assemblée générale de la V.Esp-o.
Chaque membre est invité-e à participer.

De 12h30 à ... 18h, notre traditionnel VESPA PIKNIKO. Chacun apporte de quoi manger (un plat, dessert ou boisson) que nous mettrons en commun.

Cette journée à pour but de se rencontrer (en français) et de faire la connaissance de nouveaux membres ou de personnes intéressées par l'Espéranto.

Toute nouvelle personne est donc cordialement invitée à cette journée.

L'adresse du jour :

Rue de la terre Franche, 33

5310 LONGCHAMPS

Pour toute information complémentaire : Jean ANNET
0495 10 32 30 - esperanto.wallonie@gmail.com

Jean ANNET
Prezidanto de la V.Esp-o



Comment distinguer les prépositions TRA et TRANS ?

Dans le Fundamento et l'Universalala Vortaro, on trouve les définitions suivantes :

- **TRA** : *F* : à travers *E* : through *G* : durch *R* : Чере́зъ, сквъзъ *P* : przez (vskros')
 1. *Prepozicio por esprimi movon, agon de unu ekstremo al la alia.*
 2. *Prefikso kun la sama senco !*
- **TRANS** : *F* : au-delà, trans *E* : across *G* : jenseit, über *R* : Чере́зъ (надъ) *P* : przez, prze-
 1. *Prepozicio por esprimi lokon , kiu estas ĉe la alia flanko de objekto aŭ direkton al tiu loko.*
 2. *Prefikso por esprimi movon trans io, de unu loko en alian.*

En néerlandais, on trouve : TRA = door, doorheen, via, et TRANS = over, aan de overkant van.

Malgré ces définitions, il faut bien reconnaître que les différences entre les emplois de tra et trans ne sont pas très évidentes. D'autant plus que nous constatons peu de différences pour les deux langues slaves (russe et polonais) ! Et confondre tra et trans n'empêche en général pas la compréhension du message.

Essayons donc malgré tout, d'y voir un peu plus clair, en examinant divers exemples !

En français, TRA a donc la signification 'à travers', 'en passant par', 'le long de'. C'est une préposition qui se rapporte soit à un lieu, soit à un temps :

Préposition de lieu qui désigne un mouvement d'une origine à une extrémité, y passant et atteignant l'autre extrémité : « Iri tra koridoro », « iri tra la stratoj » (déambuler dans les rues).

NB : Si on désire indiquer que le mouvement va plus loin que l'extrémité, on peut utiliser l'accusatif :

1. « Iri tra la urbo » (aller à travers la ville et y rester) ;
« iri tra la urbanon » (aller à travers la ville et en sortir).
2. Préposition de temps qui désigne une action qui dure du début à la fin : « la koko krias tra la tutan nokto » (le coq crie toute la nuit).
3. TRA peut aussi être utilisé comme préfixe, avec plusieurs nuances : « Traigi » : faire passer au travers ;
« tralegi » : lire du début à la fin ; « tralerni » : étudier complètement ; « trapasi » : passer le temps ;

« tranokti » : passer la nuit ; « travintri » : passer l'hiver (du début à la fin).

En français, TRANS a la signification 'au-delà', 'par delà', 'au dessus'

1. Sans changement de lieu : « trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj »
2. Avec changement de lieu, en utilisant l'accusatif : « La hirundo flugis trans la riveron » (l'hirondelle vola au dessus de la rivière). « Jetu la pilkon trans la muron » (jeter le ballon au dessus du mur).
3. Avec changement de temps : « Saltego trans jarmiloj » (un bond au-delà des millénaires).
4. Trans peut être utilisé comme préfixe de changement de lieu ou de temps : « Transiri la straton » (franchir la rue) ; « transplant » ; « transformi » ; « transskribi » (transcrire) ; « Transvintri » (finir l'hiver pour commencer le printemps) ; « la transmondo » (l'au-delà).

On constate donc que la différence principale entre tra et trans est que :

- **Tra** indique un mouvement dans un espace ou un temps, donnés, de l'origine à la fin, en prenant en compte ce qui se passe entre l'origine et la fin (le trajet, la durée) !

- **Trans** indique un mouvement ou un temps vers sa fin directement ou en passant éventuellement au dessus ou sur le côté. On indique aller plus loin, en utilisant l'accusatif !

Ni fine komparu : « Mi iris tra la montaro per tunelo » <=> « Mi iris trans la montaro per helikoptero ». Et : « Mi iris trans (= transiris) la montaron » (j'ai franchi la montagne pour aller plus loin).

Claude GLADY

1

A **tra** B

Vi devas iri **tra** koridoro. **M**

Mi vidis **tra** la fenestro.

2

Mi vidas **trans** la horizonto.

prepozicioN

aliaj ekzemploj

Se mi rigardas en Brazilo,
Afriko situas **trans** la oceano
Atlanta. La infano staris **trans**
la baro. Mi vidis, ke la hundo
kuras **trans** la muro.


Esperanto grammar illustration by MIGO-Esperanto

maigranda I illustrita Gramatiko, MIGO-Esperanto

pinterest.com/fredericosalmi/MIGO-Esperanto

Jeu de mots

Krucvortenigmo



Horizontale

1. kortobirdo, 6. tiu ne ŝatis glavojn, 10 unua in', 11. fermentinda frukto, 13. beligi ĉambron, 14. muziknoto, 15. luksa seĝo, 18. luksa metal', 20. anagromo de iu vorto, 22. funkciigi, 25. atentigi, 27. Internacia Lingvo, 28 malaparte, 29. basen', 30 trinksopira, 33. ne via, 34. japana naŭ, 35. dezertparadizet', 36. 2 vert. + 45 vert., 38. naŭza interjekcio, 39. Platona lando, 42. nehma kuracisto, 46. deziri, 47. ankaŭ ne, 49. iom pli ol 3, 50. batet', 53. Nederlanddevena Sud-Afrikano, 54. iri kiel likvo, 56. Ŝvejka lando, 58. ovalaj', 59. tiu devis eviti la sunon, 60. notego, 62. gramatiklaĵo, 63. voka interjekcio, 64. frenezeta, 65 C₂H₆O.

Vertikale

1. manĝebla kapitulo, 2. nombro da malvirtoj, 3. okazaĵ', 4. genro de mamuloj kiel ŝafo, 5. deviga sufikso, 6. prep., 7. bela (?) kreitaĵ', 8. iri al postmondo, 9. la sepa arto, 12. taŭge, 16. nobla metal', 17. por enmeti 58 hor., 19. medicina tekniko, 21. grasaĵ', 23. lavabo, 24. malkomplimenti, 26. cilindro, foje muzika, 28. perono, 31. agi, 32. ĉevalparenc', 37. urbo en Pollando, 40. kartvela lingvo, 41. malbonĝanca litero, 43 ne-en, 45. tre malmulte, 46. distilita fortajo, 48. forerigo, 51. hidi, 52. netut', 53. gantsporto, 54. tiu kaptas la vermon, 55. rangantaŭa, 57. aragona popoldanco, 61. prep.

Elſutu la solvon de la enigmo ĉi tie:

<https://mallonge.net/eem2023-2-solvo>

V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Gladys.

Renseignements : cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi - <https://esperanto.be/charleroi>

Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

Eghezée Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

Huy Eliane Pironnet - epironnet@gmail.com
0494 230 234

Liège - <https://esperanto.be/liege>

Eric Nemes - eric.nemes@gmail.com
0494 230 234

Verviers - <https://esperanto.be/verviers>

Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be
087 33 02 92

Tables de conversation :

Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262 20 64 -
<https://mallonge.net/td>

Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

Planifiez vos vacances

Internacia Kalendaro de Eventa Servo

Sur l'Internacia Kalendaro d'Evento Servo, vous trouverez un aperçu des rencontres les plus importantes d'espérantistes dans le monde. Rendez-vous sur <https://eventaservo.org/ik>



Autres personnes ressources

- Contact presse : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Gladys 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !**

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !


L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52



P001014

Lobbes

6540-dépot

V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Éditeur responsable: Jean ANNÉT
Expo : Jean-Pol Sparrenberg
Rue de Thuin, 20 - 6540 Lobbes